


# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2006



*Turku invitas al Vintraj Tagoj. Informoj sur p. 13-19.*

## **Nino Runeberg, la unua prezidanto de EAF, p. 18**

Intervjuo: Kathrin Delhougne el Esperanto-Muzeo, p. 10  
Fabelkonkurso 2005, p. 4 ♦ Recenzoj, p. 9 & 21

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef\_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

tuomo.grundstrom

*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

*Auli Vihermä*, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



## Prezidento de du lingvoj

Kiam ĉi tiu gazeto venas al la legantoj, ni jam scias, kiu estos la prezidento de Finnlando dum la sekvaj ses jaroj. Kiam mi skribas ĉi tion, ni ĵus eksciis la rezultojn de la unua baloto kaj la du plej multe balotitaj kandidatoj sin preparas por la kampanjo de la dua baloto.

Unu temo en la diskutoj por la prezident-elektaj kampanjoj estis la dulingveco de Finnlando. Tio ja ne estis inter la plej centraj temoj, ĉar la prezidento nenion decidas pri la situacio de la du oficialaj lingvoj, tion faras la parlamento. Sed nature oni volas aŭdi opiniojn de la prezident-kandidatoj pri la afero.

Inter la ok kandidatoj ĉi-foje estis du, kies denaska lingvo estas la sveda, tio estas multoble pli ol la proporcio de svedlingvaj loĝantoj de Finnlando. Tamen la kunkalkulita kvanto da voĉoj por tiuj du estis malpli ol la proporcio de svedlingvanoj.

Ĉiuj ĉi-fojaj kandidatoj reale povis paroli la svedan eĉ bone. Tiel ne ĉiam estis, ĉar iun fojon ĉe prezident-elekto okazis, ke parto de la kandidatoj en komuna svedlingva televida debato parolis finne, nur subtekstitaj svede.

Ne estas leĝe postulata, ke la prezidento devu scipovi ambaŭ lingvojn, sed estas atendate, ke la prezidento pretu fari siajn oficajn taskojn ambaŭlingve. Ekzemple la tradician novjaran parolon, kiun la prezidento parolas en televido ĉiam la unuan tagon de jaro. Laŭtlegado de tiu anticipe preparita parolo ne postulas tre fluan scipovon, sed certe sonus iom stranga, se la prezidento nur legus la tekston sen vera scipovo de la lingvo.

Aktuala afero, kiu koncernas la situacion de la sveda lingvo en Finnlando, estas transiro al diĝita televido. Parto de la programoj de la ŝtataj kanaloj estas svedlingvaj. Tiel estas ankaŭ en la jam funkcianta diĝita televido, kaj per plimultiĝo de la nombro de kanaloj ankaŭ la kvanto de svedlingvaj programoj kreskas – proporcie de la tuto tamen malkreskas.

Malfavora novaĵo estas, ke oni ĉesos sendi kanalon SVT Europa, kiu estas kolektaĵo el programoj de la kanaloj de la ŝtata televido de Svedio.

Oficiale la sveda, kiun oni parolas en Finnlando, estas la sama lingvo, kiun oni parolas en Svedio. Praktike la finna prononco de la sveda lingvo tamen klare distingiĝas disde la svedlanda sveda. SVT Europa ofertis por ni finnoj taŭgan manieron aŭdi la prononcon, per kiu oni povas kompreni kaj iĝi komprenata en Svedio.

Estas iom kontraŭdire, ke oni dediĉas grandajn sumojn da mono por instrui la svedan por ĉiuj en lernejoj, sed volas en la televido nun ŝpari monon el tio, kio povus realigi la saman celon. SVT Europa ja estas en Finnlando la sola facila maniero daŭre aŭdi parolon de la svedoj, kaj bonaj televidaj programoj povus formi realan instigon por finnoj aktive lerni la svedan.

Alia afero estas, ke SVT Europa bedaŭrinde ĉiam havis tre malmultajn interesajn programojn kaj tial ne estis efika instigo lerni la lingvon. Tamen oni povus supozi, ke ankaŭ la svedoj povus havi sian propran intereson sendi bonajn televidajn programojn en Finnlandon. Se la ŝtata televido ne kapablas fari tion, eble iu komerca televido en Svedio trovos la ekzistantan niĉon?

*Mikko Mäkitalo*

## Fabelskribantoj en 2005

Inter la rezultoj de la fabelkonkurso de Päätalo-instituto aŭtune 2005 montriĝis du interesaj aferoj. La plej bona fabelo FABELO INTERNACIA 2005 estis skribita de grupo, kaj tio okazis la unuan fojon. Kaj post klarigo de la kaŝnomoj aperis, ke la venkinto de ĉiu alia kategorio estas el la sama familio Bolognesi el Italio. Laŭ la antaŭscioj pri la konkurso la ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. Do, ĉi tiu gefrataro devas esti speciale kreivaj. Ni konatiĝu kun ili kaj la antaŭmenciita grupo.

La infanoj estis intervjuataj rete aŭ letere. La tri knabinoj de la grupa fabelo renkontiĝis en infanaj kongresetoj kaj aliaj familiaj kunvenoj. Alice loĝas en Belgio, Aniko en Hungario kaj Gretel en Francio. Ili ne studis la internacian lingvon, sed lernis ĝin hejme, ĉar la gepatroj uzas ĝin. Dum la renkontiĝo somere ili kune verkis la fabelon, kiu ricevis la nomon "Princino Liliana kaj la blanka ĉevalo". La knabinoj estis ĉ. 12-jaraj kiam tio okazis.

La gefratoj Bolognesi estas Anna 8-jara, Giuseppe 11-jara kaj Chiara 13-jara. La amiko de ilia avo kaj gepatroj iam proponis al ili lerni Esperanton kaj donis al ili la libron "Esperanto por infanoj". La agrabla libro pri musoj interesis ilin kaj iomete ili lernis sed ne sufiĉe por skribi fabelon. Sed fabelojn ili ŝatis kaj sciis verki jam en lernejo. Ili decidis fari la rakontojn en la itala

lingvo kaj poste traduki ilin Esperanten. La maljuna instruisto helpis ilin.

Anna, Giuseppe kaj Chiara estas aktivaj infanoj. La du knabinoj dancas klasikan dancon kaj ludas bone pianon. Krome por Anna la pupoj kaj ludado kun ili kaj "dorlotado kun la patrino" estas gravaj sed Chiara volonte iras en teatron aŭ kinejon kun siaj gepatroj aŭ legas bonan libron, "pli bone se ĝi estas...flava!". Giuseppe "la viro de la familio" ludas violonon kaj "eble iam...vi vidos lin..en granda koncerto". Li ludas en la urba teamo de korbopilko aŭ ŝotas futbalon kun sia patro.

Anna skribis pri "La donaco", Giuseppe "La atako de la drako" kaj Chiara pri "Koro de feino". La temoj estas fabelecaj, kiel la reguloj postulas. Por ili estis grava afero vidi sian nomon en Interreto.

En <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituuti/esperanto.htm> estas legeblaj ĉiuj premiitaj fabeloj. Indas legi.

En la prezento de la pasintjaraj venkintoj videblas, ke infanoj kun diferenca kono de Esperanto povas verki fabelon kaj partopreni en la konkurso.

La respondojn de la infanoj legis kaj kombinis

*Sylvia Hämäläinen, ĵuriano*

*La Fabelo Internacia 2005*

### Princino Liljana kaj la blanka ĉevalo

Estis iam tre bela sovaĝa blanka ĉevalo. Ĝi vivis tute libere, ĝis iun tagon venis maliculoj, kaptis la ĉevalon, kaj devigis ĝin labori en ilia minejo. La ĉevalo devis vivi la tutan tempon subtere kaj tiri pezajn ĉarojn plenajn de karbo. Aldone ĝi nur ricevis putrantajn terpomŝelojn kiel manĝ-

ojn, kaj la maliculoj batis ĝin, kiam ĝi tiris la ĉarojn tro malrapide.

Iam, la plej malica el la maliculoj batis ĝin tiel forte, ke la ĉevalo trekoleris. Ĝi provis rebati per siaj antaŭaj hufoj, kaj ĉe tio la ŝnuro ŝiriĝis, per kio ĝi estis ligita al la ĉaro. Tuj la ĉevalo komprenis sian ŝancon, kaj kuris el la minejo eksteren en la arbaron.

Okazis, ke tiu estis la arbaro ĉirkaŭ la reĝa kastelo, en kiu la filino de la reĝo, princino Lil-

jana, kutime promenadis en la posttagmezo. Liljana ofte vizitis sian amikon Ĵaki, kiu loĝis en kaŝita kabano kaj estis tre malriĉa. Tial la princino kutime kaŝprenis kelkajn manĝaĵojn de la abunda tagmanĝo en la kastelo por donaci al Ĵaki.

Ankaŭ en tiu ĉi tago, ŝi portis korbon kun fromaĝo, karotoj kaj pano, kiam subite ŝi vidis ie inter la arboj ion blankan. Kaŭrante ŝi alproksimiĝis al la loko, kaj trovis tre belan blankan ĉevalon. Tamen la ĉevalo aspektis iom magra, kaj kelkloke ĝi havis vundojn, ŝajne ĉar iu batis ĝin. Ĝi ankaŭ estis malpura – ĉie makulis ĝin karbopolvo.

Sed belega ĝi ja estis, kaj princino Liljana tuj enamiĝis en ĝin. Kiam la ĉevalo ekvidis la princinon, unue ĝi ektimis, sed ĉar ĝi estis tre malsata, ĝi ne tuj forkuris. Ja ĝi flaris ion manĝeblan en la korbo, kiun la princino portis.

La princino rigardis la ĉevalon rekte en la okulojn, ekstaris, kaj malrapide, paŝon post paŝo, aliris ĝin, etendante la korbon. Kvankam la ĉevalo estis sovaĝa, ĝi ne povis rezisti la malsaton, kaj formanĝis ĉion el la korbo. Kaj poste ĝi eĉ permesis al la princino grimpi sur ĝian dorson. Unue malrapide, poste pli kaj pli rapide ili rajdis tra la arbaro.

Kiel princino, Liljana kutimis rajdi, sed ĉi-foje ŝi ja povis teni sin nur ĉe la kolhararo, kaj preskaŭ falis de la ĉevaldorso. Tiel la du novaj amikoj atingis ĝis la malantaŭa flanko de la kastelo, kie situis sekreta pordo. Estis iom malfacile konduki la ĉevalon tra la malvasta sekreta koridoro, kiu finiĝis en la dormĉambro de la princino. Tie la princino purigis la felon de la ĉevalo, flegis ĝiajn vundojn, kaj donis abunde por manĝi. Ŝi iris ankaŭ en la reĝan ĉevalejon por kaŝe preni jungilon kaj bridojn, por ke ŝi ne denove minacu fali.

La sekvan matenon, la reĝo venis al la pordo

de la dormĉambro, ĉar li emis je frumatena rajdado antaŭ la matenmanĝo, sed mankis jungilo kaj bridoj en la ĉevalejo! Longe li devis frapi la pordon, ĝis Liljana finfine vekigis. Rapide ŝi ordonis al sia nova amiko kuri en la sekretan koridoron, kaj iris malfermi la pordon al sia patro. Sed pro la abunda manĝo, la ĉevalo jam redikiĝis kaj ne plu sukcesis premi sin en la koridoron!

Kiam la reĝo vidis la postaĵon de la ĉevalo, li tre koleris. Timigite, la princino vokis: “Kuru, mia ĉevalo!” En tiu momento, ĝi finfine sukcesis trairi, kaj ankaŭ Liljana postkuris. La reĝo, kiu tre amis sian filinon, timis, ke ŝi ne plu revenos en la kastelon. Tial li ordonis

al sia ĉasisto serĉi ilin en la arbaro, kaj mortigi la ĉevalon.

Ne daŭris longe, ĝis tiu trovis ilin, kaj tuj li pafis al la besto. Laŭte ĝi henis, kaj falis surteren. Do la ĉasisto reiris al la reĝo kaj raportis, ke li sukcese plenumis la ordonon.


Fakte la ĉasisto trafis ĝuste sur la jungilon, kiu bremsis la kuglon. La ĉevalo estis dolore vundita, sed ĝi ne mortis. Lil-

janan kaptis granda timo, kiam ŝi vidis sian amikon fali, sed poste ŝi konstatis, ke la ĉevalo ankoraŭ vivas. Tuj ŝi kuris al sia amiko Ĵaki.

Tiu plenditis: “Mi atendis vin hieraŭ, sed vi ne venis.”

Tiam ŝi rakontis al Ĵaki, kio okazis. Kompreneble li pardonis, ke ŝi ne alportis al li manĝaĵon. Rapide li prenis el malluma angulo de sia kabaneto kelkajn kuracherbojn. Per tiuj, la ĉevalo resaniĝis mirinde rapide.

La reĝo dum la sama tempo esperis, ke lia filino forgesos rapide la ĉevalon, kiun li kredis morta. Sed dum la tuta tago kaj la tuta nokto la princino ne revenis en la kastelon. Do li ordonis al sia lignohakisto kontroli, ĉu la ĉevalo vere mortis, kaj kien malaperis la princino. Post tempo tiu trovis la ĉevalon ligita apud la kabaneto, ▷





## Kiel pligrandigi niajn fortojn?

Kiel ni sukcesu utiligi la personajn kaj organizajn talentojn de nia movado? Kiel disdividi la taskojn? Kiel kunordigi? Tiujn temojn traktis via prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario en aparta plankunveno en januaro. Ni vigle diskutadis, sed ne sukcesis trovi la ĝustajn solvojn. Ni konstatis ke ni tiom multe okupiĝas pri necesaj asociaj detaletoj ke ofte mankas al ni fortoj transdoni taskojn, eĉ atenti bonajn proponojn de la membraro aŭ proponi novajn, pli praktikajn solvojn.

Ĉu niaj membroasocioj povus alpreni organizan respondecon pri projektoj, jubileaj seminarioj kaj aliaj eventoj? Estas ĝojige ke ĉi-jare

grandparte VT kaj AT estas loke organizitaj. Ĉu organiziĝi en temajn laborgrupojn? Ekzemple pri historio jam okazas signifaj progresoj. Nun ni atendas tre gravajn decidojn de la kulturaj fondaĵoj: ĉu mono disponeblas pri la historilibra laboro? Ĉu ni havas monon por pliaj projektoj, ĉu por ebligi partatempan, profesion prizorgon de asociaj taskoj? Kiel trovi 100 000 eŭrojn?

La gazeto en viaj manoj ofertas multajn erojn por trakto ĉe klubaj kafotabloj: En 1970 UEA havis 280 IM de Finnlando. Post lego pri Nino Runeberg rekomendindas aliĝo al la samnoma societo – kaj partopreno en la marta akcepto. La interreta planlingva katalogo donas aliron al historiaj trezoroj en Vieno.

Viaj konsiloj estas bonvenaj!

*Anna Ritamäki*

▷ kie Ĵaki kaj la princino ankoraŭ profunde dormis. Li forkondukis ĝin al kaŝita groto, kaj kun helpo de siaj kolegoj rulis gigantan rokon antaŭ la enirejon.

La tutan tagon, Liljana kaj Ĵaki vane serĉadis la ĉevalon en la tuta arbaro. En la vespero de la dua tago, Ĵaki diris al la princino: “Ni serĉis dufoje en la tuta arbaro. Ni rezignu nun.”

Sed Liljana ne volis rezigni: “Ni sidu kaj pensu: ĝi ne povas esti glutita de la tero!”

“Sed ja!” vokis Ĵaki. “Ĉu vi ne memoras tiun groton en la mezo de la arbaro. Ni pasis antaŭ ĝi kelkfoje, sed ni ne enrigardis.”

“Kompreneble ne.” respondis la princino, “La enirejo estas fermita per granda roko.”

“Tamen ĝi estas la sola loko, kie ni ankoraŭ ne rigardis.”

Ĵaki kunvokis amikajn bestojn el la tuta arbaro, kaj per kunigitaj fortoj ili sukcesis forruli la rokon. La ĉevalo pasigis teruran tempon en

la groto. En plena tenebro, ĝi povis palpi per siaj hufoj skeletojn, kaj aŭdis la akran fajfadon de la ratoj, kiuj certe atendis ke ĝi mortu. Kiam finfine la amikoj malfermis la enirejon, ĝiaj okuloj estis blindigitaj pro la lumo. Liljana tuj kun granda ĝojo kuris al sia amiko, kaj svingis sin sur ĝian dorson. Sed la ĉevalo nur timis, ĉar ĝi ne rekonis la princinon, deĵetis ŝin kaj kuris for. Liljana kredis, ke la ĉevalo ne plu amas ŝin, ĉar ŝi kaŭzis tiom da suferoj al ĝi. Trista ŝi reiris hejmen, enŝlosis sin en sia ĉambro kaj ploregis senĉese. La reĝo, kiu tre ĝojis pri la reveno de sia amata filino, ne kapablis konsoli ŝin.

La sekvan tagon, ŝi ne plu eltenis la grandan malĝojon, iris al la kastela lageto, kaj ĵetis sin en la akvon por droni. La reĝo vidis tion de sia balkono, kaj jam volis ekkuri al la lageto, kiam li vidis de la alia flanko alkuri la blankan ĉevalon! Ja la ĉevalo ne forgesis sian amikinion, kaj revenis, por peti pardonon, ke ĝi forĵetis ŝin.

# 100-jariĝa jubileo de franca Kultura Esperanto-Centro

La 10an kaj 11an de decembro 2005 ni havis la honoron partopreni la centjariĝon de la Kultura E-Centro de la regiono ĉirkaŭ la urbo Tours. Ĉar Raita Pyhälä tie prelegis pri kulturaj diferencoj inter francoj kaj finnlandanoj, estis interese observadi la jubileadon. La programo, kun niaj komentoj:

– sabate, franclingva prelego (Unu lingvo por Eŭropo, ĉeestis 80-90 da interesatoj) kaj granda kolora ekspozicio en la biblioteko de la urbo Tours (elegantaj presitaj kaj zorgeme elektitaj afiŝoj ne tro plenaj de informoj, kun desegnaĵoj de diverslandaj infanoj pri andersenaj fabeloj kaj ties verkisto);

– honoriga kunveno prezidata de la delegito pri kulturaj aferoj de la urbodomo de Tours (abunde da ŝaumvino, aliaj trinkaĵoj, frandaj kuketoj, vigla interparolado);

– dimanĉe, katolika Sankta Meso – kun eklezia aprobo – en Esperanto en preĝejo ekster Tours (iuj francoj nenion eklezian aprobas kaj

*Parto de la ekspozicio en la biblioteko de Tours. La tri pli malgrandaj bildoj estas desegnaĵoj de infanoj pri andersenaj temoj.*



La reĝo vokis: “Liljana ĵus dronis en la lageto!”

Tiam la ĉevalo senhezite postsaltis en la akvon. Pasis longaj sekundoj, ĝis ĝi reaperis ĉe la bordo kun la senkonscia princino sur sia dorso.

Nun la reĝo vere kuregis al ambaŭ, kaj skuis sian filinon: “Liljana, Liljana, ĉu vi ankoraŭ vivas?!” Tiam ŝi malfermis la okulojn, kaj diris: “Paĉjo! Mia ĉevalo! Mi amas vin! Mi amas vin ambaŭ!”

La reĝo respondis: “Ankaŭ mi amas vin ambaŭ!”

De tiu tago, la ĉevalo rajtis resti en la kastelo, kaj vivis ankoraŭ longe kaj feliĉe kun princino Liljana.

*Alice Larue, Aniko Hegedus kaj Gretel Schumann*



ili rifuzis partopreni, sed la koruso entuziasme kaj bele kantis en E-to);

– prelego de R. Pyhälä (30-40 minuta, parte improvizita, ĉar ŝi ĉiel volis ne tedi la aŭskultantaron kaj ne legis en siaj antaŭskribitaj paperoj);

– prelego pri la unuaj jaroj de la esperantista grupo de Tours (40-50-minuta);

– 2-3-hora bankedo en restoracio (la prezo 22 eŭroj rajtigis al 1/4 litro da ruĝa vino), kie kunmanĝis sesdeko da esperantistoj. La senfenestra restoracio Cave Saint Antoine situas en subtera ŝtonminejo kaj en ĝiaj muroj videblas spuroj kaj fosilioj de marbestoj. Ĉirkaŭ la murlampoj videblas io verda sur la blanka nemalmola roko. Tio estas musko, kiu ekkreskas pro la “poluaĵoj”, kiujn enportas la vizitantoj sur si. (La samo okazis en la grotoj de Lascaux, kiujn oni ja devis fermi por ŝpari la originalajn pentraĵojn.)

La MENUO, ege grava parto de la jubilea festo, estis skribita jam aŭtune en invitletoj, kaj poste oni vidis ĝin en la restoracio sur verdaj rubandoj noditaj al malgrandaj artefaritaj rozoj

donacataj al ĉiu manĝonto. Kelkaj rubandoj surhavis ankaŭ steletojn, kaj per tiuj oni gajnis premiojn en la post-manĝa lotumado. La restoracio estis ornamita de multaj koloraj balonoj, sur kiujn la virinoj de la E-grupo estis skribintaj humurajn aŭ aliajn sciigojn: oftajn E-esprimojn, kiaj “bonvolu”, “saluton”, “dankon”, “silentu”, kaj aliaj, eble lernitaj en elementa kurso. Per la balonoj oni ankaŭ indikis la vojon al la necesoj.

La speciale ornamita ejo kaj la bonaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estigis belan festoetoson. Ĉe unuj tabloj oni spontane ekkantis, ĉe aliaj oni fotadis, anekdotis kaj ŝercis; ĉiuj ĝuis la renkontiĝon. Pli la vestaĵoj: nia problemo pri la sinvestado estis tute nenecesa. Ŝajnis, ke multaj francoj preferas vesti sin modeste kaj komforte eĉ por tia festeno. Viroj ne surhavis kravatojn kaj kostumojn. Longe daŭrigu la esperantistoj de la regiono ĉirkaŭ Tours! Ilia frapfrazo estas: ESPERANTO: Ponto inter la homoj.

*Raita kaj Matti Pyhälä*

*Matti kun du junulinoj en Tours.*






## Vikinga rakonto

*Leif Nordenstorm: Arne, la ĉefido. Ilustraĵoj Pavel Rak. 112 p. KAVA-PECH, Dobrichovice, Ĉeĥio 2005. ISBN 80-85 853-77-9*

La kovrilo de la libreto montras vikingan drakoŝipon kun blankruĝa velo kaj vikingojn starantajn sur la bordo, kun glavoj, lancoj kaj ŝildoj enmane. Oni preskaŭ aŭdas ilian interparoladon, en kiu miksiĝas scivolemo, suspektoj, sindefendemo kaj aventuremo. Militon oni volas eviti. Ĝuste tia estas la rakonto. Temas pri la 9a jarcento en Nordio kaj pri novaj ideoj en la homa



junaj legantoj.

*Saliko*

## Ne nur fabeloj

*H.C.Andersen: Bildolibro sen Bildoj. Ilustraĵoj de la Muzeoj de la urbo Odense (plejparte papertranĉaĵoj kaj desegnaĵoj de H.C.A mem). Tradukita el la dana originalo Billedbog uden Billeder de Birthe Traerup. 56p. Edition Traerup. ISBN 87-90537-06-8*

En la revuo Norda Prismo 1957-59 aperis kelkaj ĉapitroj de la *Bildolibro sen Bildoj*, tradukitaj de kopenhagaj esperantistoj. Okaze de la 200-jara datreveno de naskiĝo de H. C. Andersen B. Traerup decidis esperantigi la tutan *Billedbog uden Billeder*, kiu fascinis ŝin de duonjarcento. H. C. Andersen verkis ne nur fabelojn sed ankaŭ romanojn, vojaĝraportojn kaj poemojn.

Inter ili tute speciala estas tiu ĉi romantika libro, kiu estas kolekto de vortpentraĵoj inspiritaj de la luno en 33 vesperoj. Krome, H. C. A. estis inspirita de *Lieder ohne Worte* de Felix Mendelssohn-Bartholdy. En naŭ tre mallongaj ĉapitroj, kiujn li nomas vesperoj, li primemoras landojn vizititajn de li; en tri “vesperoj” li revas

pri foraj landoj neniam viditaj de li. En aliaj ĉapitroj li pritraktas la vivon kaj pensmanieron de infanoj aŭ malbonsortuloj en nia maljusta mondo. “La homo povas esti tre malfeliĉa, kaj tamen tre afektita. Li pensis pri la morto, pri suicido, mi kredas, ke li priploris sin mem, – li ploris profunde, kaj kiam oni bone satploris, tiam oni ne mortigas sin.” (prifajfita aktoro en la Deknaŭa vespero).

Por omaĝi al Andersen danaj esperantistoj multege laboris kaj tradukis. Vidu la rezultojn ĉe [www.brunajokuloj.dk](http://www.brunajokuloj.dk) kaj [www.chifonoj.dk](http://www.chifonoj.dk).

*Saliko*

## ✉ Deziras korespondi

Sudbrazilano, el Ŝtato Rio Grande do Sul (Granda Rivero el la Sudo), publika funkciulo de la brazila Respubliko, naskita 1965, interesiĝas pri la homa vivo ĝenerale.

Marco Antonio Ferreira Teixeira, Rua Ernesto Alves, 945, Cartório Eleitoral, Santa Cruz do Sul -RS – Brasil, BR-CEP:96810060.

Rete: <[marcofer@tre-rs.gov.br](mailto:marcofer@tre-rs.gov.br)>

## Ŝtata muzeo pri Esperanto

En Wien, Aŭstrio, funkcias muzeo pri Esperanto. **Kathrin Delhougne** el la muzeo iĝis intervjuata por nia gazeto.

*Kiom da homoj laboras por la muzeo?*

Ni estas kvar, du plentempaj, du duontempaj. Sed ne nur por la Muzeo, sed ankaŭ por nia biblioteko, la Kolekto por Planlingvoj. Mi laboras en la Muzeo ekde majo 2005 – kaj duontempe.

*La muzeo estas parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Ĉu vi povus iom klarigi la organizan strukturon? Ĉu Eo-asocioj havas ian rolon pri la aferoj de la muzeo?*

La Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) konsistas el tiel nomataj “Kolektoj”, t.e. sekcioj, kiuj sin dediĉas al specifa temo, i.a. la Kolekto por Bildoj, la mondfama Kolekto por Muzikaĵoj, la Kolekto por Papirusoj ktp. Kaj unu el ili estas la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo. Do, temas pri nemovada institucio kaj neniu ajn decidas pri ĝi krom ANB kaj la Federacia Respubliko de Aŭstrio.

*Kiom da objektojn vi havas en la muzeo?*

Nu, ni havas 25.000 volumojn, 2.500 diversajn gazetojn, 2.000 muzeajn objektojn, 2.000 aŭtografojn kaj manuskriptojn, 20.000 fotojn, 1100 afiŝojn kaj 40.000 flugfoliojn, centojn da kasedoj kaj diskoj.

*Ĉu la muzeo havas iu(j)n speciale trezora(j)n objekto(j)n?*

Inter la raraĵoj estas ekz. la unua libro de Esperanto, inter la unikaĵoj estas manuskriptoj de Zamenhof, Edmond Privat, de I. Shirjaev (aŭtoro de la unua originala romano).

*Kiajn objektojn vi esperas ricevi? Ĉu vi deziras ricevi plejeble ĉion pri Esperanto aŭ ĉu venos tro multe da aĵoj se homoj sendas ĉion?*

Nu, ni vere akceptas ĉion ajn, kio koncernas Es-

peranton, t.e. printaĵoj, manuskriptoj, objektoj kun Esperanta surskribo ktp. Kaj ni tute ne timas ricevi tro da aĵoj. Se ekz. vi

volas, ke viaj posteuloj sciu pri via nacia kongreso, sendu la kongresdokumentojn al la Esperantomuzeo. Ni konservos ilin por la futuro.

*Kiuj estas la ĉefaj taskoj de la muzeo? Kiajn servojn vi ofertas al vizitantoj? Kiajn servojn vizitantoj plej ofte demandas?*

Nu, la nova Muzeo donas fundan informon pri Esperanto: pri ĝia historio, pri ĝia gramatika strukturo kaj pri la movado kaj la praktika flanko de Esperanto. Ofte okazas, ke homoj estas pli ol unu horon en tiu malgranda muzeo por elĉerpi ĉiujn informojn prezentitajn tute moderne – kaj amuze, surbaze de komputilaj instalaĵoj. La plej ofta demando poste estas: Kiel mi povas lerni Esperanton?

*Kiom da vizitantoj (ekz. en tago aŭ en jaro) kutime vizitas? Ĉu la vizitantoj estas plejparte esperantistoj aŭ ĉu multe da hazardaj ne-esperantistaj homoj venas? Se venas ne-esperantistoj, ĉu ili ofte havas strangajn miskomprenojn pri Esperanto?*

La malfermo de la nova muzeo estis la 1-an de decembro. Kaj en decembro ni havis 300 vizitantojn, tiel ke ni povos antaŭkalkuli, ke estos 3000 vizitantoj en 2006. Nur malgranda parto de la vizitantoj estas esperantistoj. Fakte, la Aŭstria Nacia Biblioteko tute profesie varbas por siaj muzeoj tiel ke la homoj plejofte scias, kio ilin atendas. Kaj la strukturo de la Muzeo garantias, ke ne estas iaj miskomprenoj pri Esperanto.



*intervjuis Mikko Mäkitalo*

## Nova adreso de la Esperantomuzeo

Por la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj komenciĝis nova fazo. Ni transloĝiĝis al pli taŭga kaj multe pli facile alirebla loko. Temas pri nove restaŭrita palaco en la centro de Vieno, tute proksime de la eksa situo. Jen ĝia adreso:

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Vieno, Aŭstrio.

Ni ankaŭ havas novajn deĵorajn horojn:

Esperantomuzeo: lun.–merkr., vendr.–sab. 10h00–14h00, ĵaŭde 15h00–19h00

Kolekto por Planlingvoj: lun.–merkr., vendr. 9h00–16h00, ĵaŭde 12h00–19h00

Sed bonvolu direkti ĉiujn sendaĵojn al la sekva adreso :

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Josefsplatz 1, 1015 Vieno, Aŭstrio.

*Kathrin Delhougne*

Tel.: (+43 1) 53410-732

*kathrin.delhougne@onb.ac.at*

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

[plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at)



*La Palaco Mollard, nova hejmo de la Esperantomuzeo.*

## lom da nombroj pri UEA-membraro

Finnlando	1950	1960	1970	1980	1990	2000	2001	2002	2003	2004	2005
IM	239	273	280	249	238	222	198	194	200	185	176
AM	-	-	200	470	603	185	204	213	210	195	194
Sume	239	273	480	719	841	407	402	407	410	380	370
UEA	1950	1960	1970	1980	1990	2000	2001	2002	2003	2004	2005
IM	5723	7194	6847	6629	7645	6583	6428	5713	5714	5856	6094
AM	8988	22991	26490	27554	25224	12522	12835	12173	11264	12148	12253
Sume	14711	30185	33337	34183	32869	19105	19263	17886	16978	18004	18347

IM = individuaj membroj de UEA

AM = aligitaj membroj (tiuj membroj de landa asocio, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA)

EAF fariĝis landa asocio de UEA en 1955. En 1955 ĝi anoncis al UEA 12 aligitajn membrojn kaj en 1956 nur 2. En la jaroj 1957-1960 EAF anoncis neniun aligitan membron. En 1961 ĝi anoncis 64 kaj ekde tiam ĝi anoncis iun nombron ĉiujare.

La ciferoj de 2005 estas provizoraj laŭ la stato de la 18-a de januaro 2006. La nombro de individuaj membroj kreskos ankoraŭ iomete ( $\pm 10$ ).

*Statistikon kolektis Osmo Buller*

## **Povilas Jegorovas, la Esperantisto de la Jaro 2005**

Internacia sendependa magazino La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Ĉi-jare la kandidatigantoj proponis 18 personojn, al kiuj la elektantoj (inter ili estas prezidanto de EAF) povis doni siajn voĉojn. Plej multe, 10 voĉojn el la donitaj 31, ricevis Povilas Jegorovas.

La internacia komisiono proklamis s-ron Povilas Jegorovas la Esperantisto de la Jaro 2005

– pro la bonega preparado kaj sukcesa realigo de la 90a Universala Kongreso de Esperanto kaj de la 4a Nitobe-Simpozio en Vilno;

– pro la ekzemplodonaj rilatoj kun litoviaj aŭtoritatoj, intelektuloj kaj amaskomunikiloj, danke al kiuj Esperanto progresas en Litovio;

– pro la kunordigo de eldonado de gravaj libroj pri Esperanto en la litova lingvo.

La solena proklamo okazis la 17an de decembro (Zamenhofa Tago) en Kaunas kun ĉeesto de pluraj esperantistoj kaj ĵurnalistoj (kvin televidoj sendis siaj raportistojn), kiuj ĝoje kuntostis je la sano de la Esperantisto de la Jaro 2005. Kazys Starkevičius, membro de la litovia parlamento, atentigis pri la graveco de la agado de la Litova Esperanto-Asocio. Halina Gorecka, kiu donis al Jegorovas la diplomon, emfazis, ke unuafoje la honoran titolon ricevis orient-eŭropano kaj ke neniam pli frue estis distingita prezidanto de la landa asocio kaj kongres-organizanto. La laŭreato klarigis, ke li akceptas la honoran titolon kiel rekonon de la tuta landa movado en Litovio.

En La Ondo de Esperanto aperis intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro 2005.

*(mm, baze de komuniko de "La Ondo")*

## **Kotizoj de EAF**

La estraro iom altigis la abonkotizojn de Esperantolehti (EF) por 2006. La abonkotizo, kiun pagas anoj de membroasocioj al sia asocio por ricevi la gazeton estas 12 e. Iuj asocioj abonas la gazeton al ĉiuj siaj anoj. Tiukaze vi ne devas pagi krompagon por ricevi EF:n.

La nura abono de EF nun estas same granda kiel la kotizo por individua membro, 18 e. Individuaj membroj de EAF aŭtomate ricevas la gazeton, kiu aperas per ses numeroj jare.

La estraro ne planas proponi altigojn de la membrokotizoj al la jarkunveno. Se vi deziras vi estas bonvenaj pagi jam antaŭ la jarkunveno laŭ la nun validaj kotizoj. La kotizo por individua membro de EAF, kiel jam dirite, estas 18 e. La subtena Societo Nino Runeberg havas kotizon 36 e (duoblo de individua membro). La kotizo kiun pagas la membroasocioj al EAF por ĉiu sia ano estas 3 e (por FEJO, ELFI kaj Steleto 1,50 e).

## **Eventokalendaro de EAF**

### **2006**

25-26.3.2006 Vintraj Tagoj, Turkuo

23-27.4.2006 EAS lige kun Euroscola-tago, Strasburgo, Francio (ELFI)

3-7.7.2006 Esperantokursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

29.7-5.8.2006 Universala Kongreso, Florenco, Italio (UEA)

6-13.8.2006 Internacia Junulara Kongreso, Sarajevo, Bosnio (TEJO)

16-17.9.2006 Aŭtunaj Tagoj, Haukipudas (Oulu-regiono)

### **2007**

28.4.2007 100-jariĝo de EAF

### **EAF-laborkunvenoj**

17-19.2.2006 Estrarkunveno kunlabore kun Sveda Esperanto-Federacio, Kimito

# Esperantohistorio en la plej malnova urbo de Finnlando

## Vintraj Tagoj en Turku 25.-26.3.2006

Aranĝoj por la Vintraj Tagoj bone progresis. Jen kelkaj praktikaj konsiloj por preparado de via partoprenado.

### La ejoj

Aurala, civitana instituto, situas en la adreso Satakunnantie 10. Satakunnantie estas la malnova vojo al Raisio. Aurala situas maldekstre tuj post la ponto, kiu proksime de la aŭtobusa stacidomo superiras la fervojon. Do, ĉi-foje eble indas veni al Turku kun buso anstataŭ trajno. Fervoja stacidomo situas je ĉirkaŭ 20-minuta piedirado de Aurala.

En Turku indas aĉeti t.n. turisman busbiletan: ĝi kostas 4,50 eŭrojn kaj validas por 24 horojn ekde la momento de aĉeto. Ĝi estas aĉetebla ĉe la ŝoforoj aŭ mendebla per poŝtelefono. Al Aurala veturas el la vendoplaĉo jenaj aŭtobusoj: 61 al Vienola (haltejo en Yrjänäkatu), 6 al Suikkila, 28 al Nättinummi kaj 11/110 al Pläkikikaupunki/Naantali (haltejo Satakunnantie).

Por propraj aŭtoj troviĝas parklokoj tuj apud Aurala. Restoracio Verkahovi, kie finiĝos nia dimanĉa rondveturo kaj kie ni havos lunĉon, troviĝas je 10-minuta piedirado de Aurala vidalvide de la aŭtobusa stacidomo.

Ĉiuj memstare aranĝos la tranoktadon. Plej proksime de Aurala-instituto situas gastejo Majatalo Metso en urboparto Raunistula kaj Hesehotelli apud la aŭtobusa stacidomo. Turku-anoj helpas vin laŭbezone, vidu kontaktinformojn.

### Ebleco vidi urbajn vidindaĵojn

Se eblas al vi alveni en Turku antaŭtagmeze sabate, ni pretas montri al vi piedirante urbajn

### Aliĝilo

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 25.-26.3.2006 en Turku.

Nomo \_\_\_\_\_

Adreso \_\_\_\_\_

Tel./Fakso/Ret-adreso \_\_\_\_\_

### Aliĝkotizo:

**18 e** ĝis 28.2.2006 \_\_\_\_\_

**21 e** poste \_\_\_\_\_

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.

Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-paketo 25.-26.3. kun manĝoj (vespermanĝo sabate, tagmanĝo dimanĉe kaj kafoj) kaj rondveturo dimanĉe: **30 e** \_\_\_\_\_

Entute pagenda al la konto de EAF \_\_\_\_\_

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra: [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

Bonvenon!

### Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville Turkuun 25.-26.3.2006.

Nimi \_\_\_\_\_

Osoite \_\_\_\_\_

Puh./fax/sähköposti \_\_\_\_\_

#### Ilmoittautumismaksu:

**18 e** 28.2.2006 saakka \_\_\_\_\_

**21 e** 28.2.2006 jälkeen \_\_\_\_\_

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman maksua.

Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäiväpaketti sisältää ruoat (iltaruoka lauant., lounas sunnunt., kahvit) ja kiertoajelun sunnuntaina: **30 e** \_\_\_\_\_

Yhteensä maksettava EAF:n tilille \_\_\_\_\_

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825. Käytä talvipäivien viitenumeroa 4640.

Lisätietoja tai toivomuksia:

---

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry

Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Sähköpostitse: [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

Tervetuloa!

vidindaĵojn. Leena Tiusanen, unu el niaj ĉiĉeronoj, montros al vi la malnovan urbocentron kaj la katedralon. Ŝi atendos vin je 11.30 ĉe la katedralo. Kun ŝi vi certe trovos konvenan lokon por tagmanĝi kaj same bone trovos vian tranoktejon. Bonvolu antaŭanonci vin al Leena aŭ al aliaj lokaj aranĝantoj.

#### Sabata kaj dimanĉa programo

La akceptejo en Aurala malfermiĝos je 13.00 sabate kaj je la 14a la tagoj komenciĝos oficiale. Ni havos tri prelegojn, krom la antaŭanoncitaj de Martti Vihanto kaj Väinö Havu, ankaŭ Carola Antskog kune kun la historia grupo pretas rakonti pri progreso de la historia verko kaj pri la unua prezidanto de EAF, Nino Runeberg. Post la kafo vi havos eblecon kunveni, rigardi historian ekspozicion en la vestiblo de Aurala kaj fari bonajn aĉetojn ĉe vendobudoj. Aŭ vi povos simple kunbabili kun samideanoj.



*Restoracio Verkahovi invitas nin por manĝo.*

Antaŭ la vespera programo estos la akcepto al membroj de Societo Nino Runeberg. Se vi volas aparte subteni la agadon de Esperanto-Asocio de Finnlando, la plej bona ebleco estas membriĝi en Societo Nino Runeberg. La subtenanta sumo estas 36 eŭroj, pago al la Asocia konto.

La vespera programo komenciĝos per vespermanĝo kaj post ĝi ni havos diversajn vesperumajn programerojn, kaj muzikajn kaj vortajn. Viaj kontribuoj estas bonvenaj, informu al lokaj aranĝantoj.

Vi, kiuj estas noktemuloj, povos poste viziti observatorion por vidi la stelojn kun Mikko Mäkitalo. Por tio prefere aliĝu provizore jam anticipe al Mikko (eblos aliĝi ankaŭ dum sabato). Povus esti konvene, se iu havus propran aŭton por veturi al la observatorio. (Vizito al la observatorio eblas ankaŭ vendrede, se vi jam tiam alvenos al Turku.)

Dimanĉe post la jarkunveno ni faros rondveturon kaj vidos sub gvidado de Jorma Ahomäki la ĉefajn esperantolokojn de la urbo kaj aŭdos pri gravaj personoj kiuj antaŭenigis la aferon en la regiono. Fine ni havos komunan lunĉon en belega malnova konstruaĵo: Verkahovi, antaŭa ŝtofa fabriko. De Verkahovi vi povos bone piediri al Aurala, eblas do lasi aĵojn tie.

## Kontaktpersonoj

**Aranĝoj surloke** (manĝoj, helpo kun tranoktaj aranĝoj ks.): EAF-sekretario kaj EST-prezidanto Tiina Oittinen, tel. 050-5494709 kaj EST-sekretario Leena Tiusanen, tel. 02-2320542, 050-575 7956 aŭ EST-estrarmembro Anja Launiainen, tel. 040-8277324, [anja.launiainen@turuntori.com](mailto:anja.launiainen@turuntori.com).

**Programo:** EAF-sekretario Tiina Oittinen kaj lokaj kunlaborantoj.

**Observatorio** vendrede/sabate: Mikko Mäkitalo, EF-ĉefredaktoro.

**Aliĝiloj:** EAF-vicprezidanto Päivi Saarinen kunlabore kun la kasisto.

# Esperantohistoriaa Suomen vanhimmassa kaupungissa

**Talvipäivät Turussa 25.-26.3.2006**

Talvipäivien järjestelyt ovat edenneet mukavasti. Tässä käytännön neuvoja tapahtumapaikoista ja muista asioista.

## Tapahtumapaikat

Kansalaisopisto Auralan osoite on Satakunnantie 10. Satakunnantie on vanha Raisioon johtava maantie, joka alkaa linja-autoaseman lähellä rautatien yli vievältä Aninkaistensillalta. Aurala on tien vasemmalla puolella heti sillan jälkeen Raisioon mentäessä. Tällä kertaa on ehkä kätevää tulla Turkuun linja-autolla junan sijasta. Rautatieasema sijaitsee 20 minuutin kävelymatkan päässä Auralasta.

Turussa kannattaa ostaa paikallisliikenteen matkailulippu, joka maksaa 4,50 e ja on voimassa 24 tuntia ostohetkestä. Lipun voi ostaa busista tai tilata tekstiviestillä. Auralaan menevät kauppatorilta paikallisbussit 61 Vienolaan, 6 Suikkilaan, 28 Nättinummeen ja 11/110 Pläkkikaupunkiin/Naantaliin. Pysäkki on linja-autoaseman jälkeen seuraava heti Aninkaistensillan toisella puolen, bussi 61 pysähtyy Yrjänäkadun puolella, muut Satakunnantiellä.

Auralan läheisyydessä on hyvin parkkipaikoja omilla autoilla tuleville. Ravintola Verkahovi, jossa syömme sunnuntain lounaan kiertoajelun päätteeksi, sijaitsee linja-autoasemaa vastapäätä (oikealla kaupungista tullessa) ja sieltä on noin 10 minuutin kävelymatka Auralaan.

Jokainen järjestää itse yöpymisensä. Lähimpänä Auralaa sijaisevat Majatalo Metso Raunistulan kaupunginosassa ja Hesehotelli linja-autoaseman vieressä. Turkulaiset yhteyshenkilöt avustavat tarvittaessa majoituksen järjestämisessä.

### **Kaupungin nähtävyyksiin tutustuminen**

Lauantaina aamupäivällä voivat halukkaat tutustua kaupungin nähtävyyksiin tuomiokirkon ja vanhan suurtorin alueella ja mahdollisesti myös ruokailla yhdessä. Oppaamme Leena Tiusanen on klo 11.30 tuomiokirkolla valmiina ottamaan ryhmän vastaan. Ilmoittaudu joko Leenalle tai jollekin toisista yhteyshenkilöistä.

### **Ohjelma lauantaina ja sunnuntaina**

Talvipäivien vastaanotto avataan Auralassa klo 13.00. Viralliset avajaiset ovat klo 14.00. Ohjelmassa on kolme luentoa, Martti Vihannon ja Väinö Havun lisäksi Carola Antskog esittelee Suomen Esperantoliiton (EAF) historiikin kirjoitustyötä sekä kertoo EAF:n ensimmäisestä puheenjohtajasta Nino Runebergistä. Kahvin jälkeen on jäsenjärjestöillä ja muilla mahdollisuus kokoontua Auralan luokkahuoneissa. Auralan aulassa voi tutustua esperantohistorian näyttelyyn, tehdä ostoksia myyntipisteissä sekä tavata tuttuja.

Ennen iltaohjelmaa on vastaanotto Nino Runeberg -seuran jäsenille. Tähän EAF:n toimintaa tukevaan yhdistykseen voi liittyä maksamalla EAF:n tilille 36 euroa (= EAF:n henkilöjäsenmaksu kaksinkertaisena). Nino Runeberg -seu-

ra on vastaava yhdistys kuin Esperanton maailmanliiton Societo Zamenhof.

Iltaohjelma alkaa yhteisellä ruokailulla. Sen jälkeen on vuorossa iltamat-tyyppinen illanvietto, jossa on musiikki- ja muita esityksiä. Ohjelmaan mahtuu vielä hyvin mukaan, joten ota yhteyttä yhteyshenkilöihin, mikäli sinulla on jokin iltaan sopiva esitys.

Yökyöpelit voivat illan päätteeksi lähteä Mikko Mäkitalon kanssa katsomaan tähtitaivaan kohteita Iso-Heikkilän tähtitornille. Ilmoittaudu Mikolle mieluiten jo etukäteen, mutta viimeistään lauantaina. Voisi olla kätevää, jos jollain tähtitornille tulevalle olisi oma auto. (Tähtien katselu voidaan järjestää jo perjantaina, ole yhteydessä Mikkoon, jos haluat olla jo silloin Turussa.)

Sunnuntaina vuosikokouksen ja kahvien jälkeen lähdemme kiertoaajelulle Turun merkittävien esperantoharrastajien jalanjäljille. Oppaamme toimii Jorma Ahomäki. Kiertoaajelun päätteeksi syömme lounaan ravintola Verkahovissa, joka on vanhan verkatehtaan tiloihin rakennetun palvelutalon lounas- ja tilausravintola. Verkahovista on 10 minuutin kävelymatka Auralaan, joten on mahdollista jättää tavaraita sinne kiertoaajelun ajaksi.





## Yhteyshenkilöt

**Järjestelyt paikalla** (ruokailut, yöpymisen avustaminen yms): EAF:n sihteeri ja EST:n puheenjohtaja Tiina Oittinen, puh. 050-5494709 sekä EST:n sihteeri Leena Tiusanen, puh. 02-232 0542, 050-5757956 ja EST:n hallituksen jäsen Anja Launiainen, tel. 040-8277324, *anja.launiainen@turuntori.com*.

**Ohjelma:** EAF:n sihteeri Tiina Oittinen ja paikallinen ryhmä.

**Vierailu tähtitornille pe/la:** Mikko Mäkitalo, Esperantolehden päätoimittaja.

**Ilmoittautumiset:** EAF:n varapuheenjohtaja Päivi Saarinen yhteistyössä rahastonhoitajan kanssa.

## Vintraĵ Tagoj en Turku Programo – ohjelma

Civitana instituto de Aurala, Auralan kansalaisopisto, Satakunnantie 10, Turku

### Sabato la 25a de marto

#### Lauantai, 25.3.2006

- 13.00 Malfermo de akceptejoj. Vastaanotto avataan.
- 14.00 Bonvenigaj vortoj kaj malfermo de tagoj. Tervetulosanat ja päivien avaus.
- 14.15 Martti Vihanto: Kolekto de Esperanto-poŝtmarkoj kaj -poŝtkartoj. Esperanto-postimerkki- ja -postikorttikokoelma.
- 15.00 Väinö Havu: Dermatologiaj aferoj en Turku. Turkulaista ihotautioppia.
- 15.30 Paŭzo. Tauko.
- 15.45 Carola Antskog: Nino Runeberg kaj historia verko de EAF. Nino Runeberg ja EAF:n historiikki.
- 16.30 Kafo. Kahvi.
- 17.00 Kunvenoj de membroasocioj kaj aliaj (ELFI, KELF, ktp). Libera babilado en la vestiblo, konatiĝo kun la ekspozicio. Kokouksia: EAF:n jäsenyhdistykset ja muut. Vapaata keskustelua aulassa, tutustumista näyttelyyn.


- 19.00 Akcepto Nino Runeberg. Vastaanotto N.R:n seuran jäsenille.
- 19.20 Vespermanĝo. Iltapala.
- 20.00 Vespera programo (vesperumo). Iltahjelma (iltamat).
- 22.00 Ebleco rigardi la stelojn en observatorio de Iso-Heikkilä, gvidas Mikko Mäkitalo. Mahdollisuus tähtien tarkkailuun Iso-Heikkilän observatoriossa, järj. Mikko Mäkitalo

### Dimanĉo la 26a de marto

#### Sunnuntai, 26.3.2005

- 9.00 Matenpreĝo de KELF. Aamuhartaus, järj. KELF.
- 9.45 Kontrolo de rajtigiloj. Valtakirjojen tarkastus.
- 10.00 Jarkunveno de EAF. Vuosikokous. Kafo tuj post la jarkunveno. Kahvi heti vuosikokouksen jälkeen.
- 12.15 Ekveturo per komuna buso al rondveturo laŭ ŝpuroj de pioniroj en Turku, gvidas Jorma Ahomäki. Lähtee kiertoajelulle yhteisellä bussilla Turun merkittävien esperantoharrastajien jalanjäljille Jorma Ahomäen opastuksella.
- 13.15 Lunĉo en rest. Verkahovi. Lounas ravint. Verkahovissa, Verkatehtaank. 4. (10-minuta distanco de Aurala, proksime de busa stacio. 10 min. kävelymatkan päässä Auralasta, lähellä linja-autoasemaa)

Etaj ŝanĝoj eblas – pienet muutokset mahdollisia. *Bonvenon – Tervetuloa!*



*Väinö Havu.*



*Jorma Ahomäki.*

## Hjalmar Johannes (Nino) Runeberg, la unua prezidanto de EAF

Dum la VT oni de kelkaj jaroj aranĝas Akcepton Nino Runeberg, omaĝe al la unua prezidanto de EAF. Post rusa subpremo dum la unuaj jaroj de la dudeka jarcento venis pli liberaj tempoj post 1905. Tiam multaj novaj asocioj estis fonditaj. En la jaro 1906 oni fondis esperantoklubon La Polusstelo en Helsinko kaj la sekvontan jaron la klubo iniciatis tutlandan asocion. Kiel prezidanto en ambaŭ funkciis Hjalmar Johannes Runeberg, pli konata kiel Nino Runeberg.

Nino estis filo de la skulptisto Walter Runeberg, kiu vivis multe eksterlande. Nino naskiĝis en Italio la 27an de majo 1874 kaj tie li ricevis sian karesnomon Nino de sia vartistino. Kiam Nino estis dujara la familio translokiĝis al Parizo kie Nino trapasis la maturekzamenon en 1892. Post studenta ekzameno ankaŭ en Finnlando 1894 li ekstudis klasikajn lingvojn kaj la francan. Li doktoriĝis en 1905. Intertempe li ankaŭ konatiĝis kun esperanto kaj partoprenis la unuan universalan kongreson en Bulonjo 1905. En sia plej konata traduko al esperanto *Jolanta* de la dano Henriko Hertz li enkonduke esprimas koran dankon al sia instruisto la franco Theophile Cart.

Nino Runeberg eldonis 1899 sian unuan poemaron (*Dikter af Alceste*). Liaj poemoj estis tre patrujamaj, evidente inspiritaj de la avo Johan Ludvig. Sekvis pliaj poemaroj sed ankaŭ teatraĵoj kaj kelkaj libretoj pri diversaj temoj. Li vivtenis sin kiel instruisto de la franca lingvo en du lernejoj en Helsinko ĝis 1919. Poste li nur verkis kaj tradukis.

Kiam la lerneja horloĝo ne plu decidis pri lia laboro lia edzino Mimmi laŭ sia letero al la bopatrino donis al li tutan liberecon pri la tempoj por dormado kaj manĝado. La du virinoj multe zorgis pri la sanstato de Nino. Li naskiĝis kiel la kvara infano en la familio sed tiam jam la tri



*Hjalmar Johannes (Nino) Runeberg  
(foton posedas Maria Runeberg).*

unuaj estis mortintaj kaj ankaŭ pri la vivo de Nino oni multe timis dum liaj unuaj jaroj. Feliĉe li kaj liaj du sekvaj gefratoj plenkreskis, same ĉiuj kvar gefiloj de Nino kaj Mimmi. En leteroj inter la parencoj oni multe skribis pri la sanstato de la infanoj sed ankaŭ notas etajn okazaĵojn. Tiel mi eksciis ke Nino ŝatis remi kaj ke li en junio 1904 faris al sia filo pafarkon.

Nino Runeberg bone ludis pianon. Nepino de Nino rakontis al mi ke li iam 1918 aranĝis koncerton por siaj amikoj. Tiam kunvenoj estis malpermesitaj kaj venis ruĝgardistoj por interrompi la koncerton. La familio fuĝis al la insularo. Danke al sia kono de muziko Nino estis speciale bona tradukisto de kantoj. Ankaŭ dum la esperantistaj kunvenoj li ofte ludis kaj por La Polusstelo li verkis propran marŝon. La muzikon al ĝi verkis Erkki Melartin.

Runeberg estis prezidanto de EAF de la unua kunsido (la 28an de aprilo 1907) ĝis la milito.

## Dimanĉa rondveturo laŭ ŝpuroj de niaj pioniroj

En marto ĝenerale jam printempas en Turku. Serena ĉielo en nia iama ĉefurbo kaptos vian atenton, se vi partoprenos la Vintrajn Tagojn de EAF. Eta aventuro atendas vin post la ĉefkunveno de nia landa asocio. Aparte fascinaj estos el pasinteco konataj, koloraj esperantistaj figuroj, kiuj sekvos nin dum la urba ekskurso 26.III.2006.

Indas trairi la urboparton Raunistula, kies ĝemelo estas Pispala en Tampere. Mondfama lingvisto G.J. Ramstedt (1873-1950) loĝis en sia juneco ĉe la adreso Konsankatu 10, kiu situis "malproksime en Maaria". Profesoro Kalle Väisälä (1893-1968) estis reputacia matematikisto. Li havis kvin filinojn kaj unu filon. Puutarhaku 7b estis ĉarma loĝloko por la tuta familio. Indas substreki, ke Kalle vojaĝis al Parizo 1914 por partopreni la dekan UK:n, kiu ne okazis pro la Unua mondmilito. Interesajn spertojn li tamen kolektis en Francio.

Orgenisto Pauli Riihivaara (1903-1995) laboris en la Katedralo de Turku, estris la koruson Amikaro kaj i.a. laŭ speciala mendo tradukis konatan kanton La Alaŭdo. Profesoroj Yrjö Väi-

sälä kaj Liisi Oterma formis fruktodonan laborduopon. Proksime al la Universitata ĉefkonstruaĵo kuŝas la Studenta domo, kie oni aranĝis la Postkongreson de la 54-a UK en 1969.

Povas esti, ke mirigas vin nomoj de multaj korifeoj, sed necesas menciigi ankaŭ nian propran Väinämöinen, jam bedaŭrinde forpasintan longtempan fakdelegiton de UEA, lokomotivestron Uno Aaltonen. Al mi ege plaĉas la vorto, kiu esprimas lian profesion.

Ne estas mia emo dronigi vin per troaj detaloj. Estu tute trankvilaj, certe vi aŭdos interesajn erojn ankaŭ pri multaj aliaj samlingvanoj dum la Esperanta urba ekskurso. Eblas krome renkonti iujn fokusajn laborlokojn de kelkaj konataj eksterlandanoj – Björn Collinder, Ivo Lapenna, István Mórocz ktp. Nia itinero zigzagas en la urbocentro kaj ambaŭborde de nia kara rivero, ne blua sed bruna. Unuhora vagado aŭtobuse kreskigos vian apetiton por la adiaŭa, komuna lunĉo en la restoracio Verkahovi.

Bonvenon tutkoran diras via ĉiĉerono Jorma Ahomäki – turkuano ek de la jaro 1952.

Post la milito EAF elektis lin honora membro. Li apartenis al la honora komitato de la universala kongreso en Helsinko 1922 kaj li tradukis la kongresan poemon de Kolomano de Kalocsay al la sveda. Mi legis ĝin en Hufvudstadsbladet, kiu kiel i.a. Uusi Suomi kaj Suomen Sosialidemokraatti abunde raportis pri la kongreso. Post la kongreso Nino ankoraŭ estis aktiva en la nova svedlingva esperantoasocio Nordlumo.

Krom pri esperanto li interesiĝis pri teozofio kaj hindaj religioj kaj dum siaj lastaj jaroj li estis framasono. Li mortis la 15an de februaro 1934. Laŭ lia volo floroj estis malmulte, sed inter la pagintoj al diversaj fondaĵoj estis ankaŭ lia esperantoamiko Albin Sandström kaj asocio de esperanto.

*Carola Antskog*

## ELFI

### Alvoko al jarkunsido

Jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI okazos je la 17a sabate la 25an de marto 2006 en Auralan kansalaisopisto (Civiltana instituto de Aurala), Satakunnantie 10, Turku. Estos traktataj la laŭstatutaj aferoj.

*La estraro*

### Kutsu vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n vuosikokous pidetään lauantaina 25. maaliskuuta 2006 klo 17 Auralan kansalaisopistolla, Satakunnantie 10, Turku. Käsitellään sääntömääräiset asiat.

*Johtokunta*

## Estraro kunvenis

La estraro kunvenis (kunsido 9/05) 3.12.2005 13.30-17.05 en la oficejo kadre de la projekto Al kvalita komunikado. Ĉeestis Ritamäki, Oitinen, Grundström, Huuskonen, Saarinen, Saastamoinen, Pirinen, parte la kasisto Heikkinen.

Antaŭ la kunsido Riitta Hämäläinen, FEJO-informisto kaj Katja Lampinen, FEJO-sekretario, prezentis konsilojn pri informado surbaze de siaj spertoj i.a. lige al KEF. La estraro trovis la prezenton tre utila kaj estis interkonsentite ke kadre de AKK okazu unutaga trejna aranĝo pri informado (tiedotuskurssi, finnlingva). Riitta kaj Katja respondecas pri la enhavo, EAF pri la praktikajoj (invitoj, trovo de loko en la ĉefurba regiono k.t.p). [Kiel verŝajna dato estis interkonsentita 27.5.2005]

La estraro kun kontento elektis Tiina Kosunen nova kasisto ekde 1.1.2006. La estraro dankis Anna-Liisan pro ŝia multjara kasista laboro.

La estraro aprobis mendon de novaj kovertoj (kun Port Paye) por poŝtigado eksterlanden por Esperantolehti (EF), estontan renovigon de la oficeja seruro (EAF-kosto 3/5) kaj elpagon de kelkaj fakturoj (je 100 eŭroj aŭ pli) por diversaj administraj kostoj. La banko altigis la prezojn por la prizorgo de valorpapiroj sed EAF lasos siajn 300 Elisa-akciojn ĉe Sampo se ne troviĝos signife pli favorkosta alternativo.

Membrovarbado-kampanjo por novaj individuaj membroj de EAF aktualas. Indas kolekti adresojn de kurspartoprenantoj kaj aliaj por sendi al ili membrovarban leteron. Ĉe TTT-paĝoj *esperanto.fi* aperu membrovarba paĝo kun aliĝilo. Post la jarkunveno estus utile sendi memorigon al membroasocioj pri la kotizoj.

La estraro traktis la planojn por Vintraj Tagoj en Turku 25.-26.3.2006 kaj Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas. Hotelo Samantta en Haukipudas kaj bustransporto Oulu-Haukipudas estas rezervitaj. Estis kontaktoj kun Esperantoparolanta orgenisto. Prikonsiderataj programeroj de AT estas i.a. ekskurso al ŝtonepoka vilaĝo Kierikki

kaj vizito al fiŝisto kiu kaptas petromizojn (finne: nahkiainen, svede: nejonöga).

Kleriga semajnfino verŝajne okazos en Hämeenlinna tuj antaŭ la somera kurso en Valamo.

EAF preparos raporton kaj precizigitajn planojn por la fina fazo de AKK por Fondumo Esperanto, kiu kunsidos 14.3.2006.

Subvencioj (nome de kunordiganto Carola Antskog kun subtenletero de EAF) por redakto kaj verkado de kompila verko pri la historio de Esperanto en Finnlando estas senditaj al Suomen Kulttuurirahasto kaj al Svenska kulturfonden.

EAF deziras instigi muzikkulturajn agantojn inter sia membraro al kunlaboro prepare al la jubilea jaro.

Tuomo Grundström informis, ke ekzistas iuj tradukoj de esperantaj literaturaj tekstoj en la finna. Esplorindas ĉu eblus aperigi ilin en finnlingvaj revuoj aŭ ĉu troviĝas eldonejo por ili.

La prezidanto donacis al la oficeja biblioteko la libron Kroppens esperanto de Birgitta Boucht. Temas pri svedlingva poemaro, eldonejo Schildts 2002.

Sekva estrara kaj AKK-grupa kunsido okazos en Källkullen, Kimito dum la semajnfino 18.-19.2.2006. Tiam okazos ankaŭ renkontiĝo kun estrarmembroj de Sveda Esperanto-Federacio.

---

## UK 2006 en Firenze

La Universala kongreso tiun ĉi jaron okazos en Firenze, ĉefurbo de regiono Toskanio en centra Italio. Ĝi estas urbo de duonmiliono loĝantaro konata pro la renesanco kaj agado de i.a. Galilei, da Vinci, Michelangelo kaj Machiavelli.

La kongreso okazos ĉe la foira konstruaĵaro *Firenze congressi*, kiu situas en la urbocentro tute apude al la ĉefa fervojstacidomo *Santa Maria Novella*. En la kongresaj retpaĝoj <http://www.ukflorenco2006.it/> troviĝas i.a. mapo pri la urbo. Atentu pri la sekva limdato de aliĝkotizoj, la 31a de marto.

(mm)

## Gustumu viverojn el dek landoj

Tre interesan iniciaton faris la japana esperantisto Hori Yasuo kiam li en majo 2004 petis siajn konatulojn sendi raportojn pri la monatoj en sia lando. Entute li ricevis raportojn de dek esperantistoj kaj havis buntan bildon pri la similecoj kaj diferencoj en diversaj partoj de la mondo. La plej aktiva skribanto estis Saliko el Finnlando. Ŝi verkis bone preparitajn rakontojn pri ĉiu monato, klarigis la signifon de ĝia esperanta kaj finna nomoj kaj



priskribis la veteron, festojn kaj kutimojn. Ankaŭ el Francio venis raportoj regule, kio estas interese pripensante ke la skribanto Michel Sanson eklernis esperanton post sia 70a naskiĝtago. Oni neniam estas tro aĝa por esperanto. Inter la plej aktivaj ni ankaŭ trovas vjetnaminon Nguyen Thi Ngoc Lan, kiu per siaj tute aliaj pensoj donas ekstran spicon al la kompoto.

Pri februaro rakontas nur la kvar supre menciitaj. Saliko rakontas ke en helmikuu (perlomonato) oni vidas belajn glacierojn kaj neĝon en la sunbrilo. Pri festoj ŝi mencias la tagojn de Runeberg, Kalevala, Valentino kaj Matti. Aliaj gravaj tagoj en februaro estas la komencotago de la antaŭpaska fastado, la nacia tago de la sameoj, internacia tago pri gepatra lingvo kaj la skolta tago por rememorado. Por ni esperantistoj ankaŭ gravas la semajno de Internacia Amikeco, la lastan semajnon de februaro. Kiam estas superjaro fraŭlino rajtas svati kaj se la fraŭlo ne volas edzinigi ŝin li laŭtradicie konsolu la virinon per tolo por jupo.

Ankaŭ en Japanio eblas por virinoj montrisan intereson al fraŭlo dum februaro. Tio okazas dum la tago de Valentino. Virinoj donacas ĉokoladon al viroj, malmultekostan al multaj viroj kaj specialan amĉokoladon al sia celato.

Hori Yasuo mencias ankaŭ la tagon de fondiĝo de Japanio, kiun li tamen ne tute akceptas. Sed ĝi ja estas libera tago kaj tiujn homoj ŝatas.

Francio estas kristana lando kiel Finnlando kaj Michel Sanson kiel Saliko mencias la karnavalan (aŭ antaŭfastan) mardon. Tamen en Francio oni festas alie ol ĉe ni. Aliaj interesaj aferoj en februaro 2005 estis la inaŭguro de eŭropa aviadilo A-380 kaj la diskutoj pri la eŭropa konstitu-

cio.

Tute aliajn monatojn oni havas en Vjetnamio. Krom la internacian kalendaron multaj vjetnamoj uzas la lunan kalendaron, kiu havas alian ritmon. En 2005 la nova jaro, la Koko, komenciĝis la 9an de februaro. En la libro Nguyen Thi Ngoc Lan priskribas la novjaran Tet-feston kaj multajn aliajn tradiciojn de Vjetnamio.

Aliaj skribis ne ĉiun monaton sed ankaŭ iliaj kontribuoj gravas por la tuto. Sendepende ĉu oni festas samajn tagojn aŭ tute aliajn estas interese kompari la diversajn tradiciojn. Ankaŭ pri sezonoj estas bone memori ke tiuj ne aspektas same en ĉiuj landoj. Por substreki tion Atilio Orellana Rojas elektis en septembro skribi ne nur pri la aŭtuno en Nederlando sed ankaŭ pri la printempo en Argentino.

La libro *Monatoj tra la Mondo* estas bona ekzemplo pri la valoro de esperanto kiel peranto de kulturoj. Krom la rakontoj ĝi enhavas ankaŭ bildojn de diversaj partoj de la mondo. Hori Yasuo revas pri pli ampleksa libro kun raportoj el ĉiuj mondpartoj kaj kompreneble ĝi estus ankorau pli impona, sed jam tiu ĉi estas tre interesa. La aŭtoroj kaj la kompilanto meritas grandan dankon.

*Carola Antskog*

## Neniu povas oficiale decidi pri nova ortografio

En la pasinta numero Harri Savolainen proponis ŝanĝi la ortografion de Esperanto. La ideon proponis multaj antaŭ li kaj dum la 1990-aj jaroj aperis eĉ malgranda gazeto kiu proponis kaj uzis similan reformon. Ankaŭ al mi la movadeto sendis ian gazeton, kvankam mi tute ne estis ilia samideano. Post jardeko aŭ tiel tiu movado malfondis sin kaj ankaŭ ilia gazeteto fermiĝis. La ĉefa problemo en tiaj reform-proponoj estas, ke ne ekzistas iu instanco, kiu rajtus fari tian ŝanĝon. La Akademio de Esperanto, kiu estas la plej supera instanco de la lingvo Esperanto, povas nur rekomendi vaste uzatan praktikon. Pasintsomere en la Universala Kongreso iu proponis al la Akademio enkonduki neŭtran pronomon apud li kaj ŝi. La respondo tiam estis: uzu ĝin, eble la aliaj sekvos vin kaj post cent jaroj ĝi estas tiom ofta, ke la Akademio povas ĝin rekomendi.

Ofte tiuj, kiuj volas proponi ŝanĝojn al Esperanto, opinias ke ĝi estas lingvo-projekto, kiun iu instanco povas reformi kaj tiel plibonigi.

Fakte, Esperanto estas, kaj estis jam dum pli ol 100 jaroj, vivanta lingvo, kies ŝanĝoj okazas nur per praktiko de lingvo-uzantoj. Povas esti, ke en Esperanto la de-supra regado de la lingvo estas eĉ malpli forta ol en pluraj naciaj lingvoj. Tamen, por ke la lingvo ne disdialektiĝu, necesas sekvi la jam ekzistantan tradicion. Pluraj aliaj planlingvoj (ekzemple volapuko kaj novial) malsukcesis simple pro tio, ke la reform-proponoj detruis la unuecon de la lingvo.

Esperantistoj estas ofte konservemaj rilate al lingvaj aferoj, kaj tial tre malmultaj reformoj estas fakte realigitaj. Tamen la letero ĥ preskaŭ malaperis, duoblaj konsonantoj (krom en vorto finno) fariĝis malpli oftaj, kaj tiel plu. En 1950-aj jaroj iu volis enkonduki novan formon Suomio anstataŭ la tradicia Finnlando. Iomete oni ĝin uzis, kaj uzas ankaŭ nuntempe, sed plejparto de finnoj neniam komencis uzi ĝin kaj tial ĝi ja troviĝas en grandaj vortaroj, sed praktike ne videblas en Esperanta gazetaro.

*Jukka Pietiläinen*

---

## BET en insulo Saaremaa

Baltaj Esperanto Tagoj okazos ĉi-jare en Kuressaare, Saaremaa, (<http://www.saaremaa.ee/>) Estonio 04.07.-08.07.2006. La strukturo de la programo estos tradicia. Kompreneble ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj. La temo de la renkontiĝo estas Unueco kaj diverseco de la popoloj ĉe la Balta maro. Krome dum BET-42 okazos la amatorarta konkurso "Kannel" (kantado, deklamado, aktorado), ekskursoj kaj Somera universitato. BET-42 okazos en la ejoj de Gimnazio de Kuressaare, Hariduse strato 13. Loĝejeblecoj estas jenaj: 1-lokaejo en la gimnazia hostelo por 5 noktoj 78 eŭroj, 2-loka por 5 noktoj 54 eŭroj, 4-loka 42 eŭroj. Entute la hostelo havas 75 lokojn. Preznivelo de la hoteloj en Kuressaare komenciĝas je 40 eŭroj nokto. Veturi al Saaremaa eblas per autobuso, pramsĝipo kaj avi-

adilo, same per propraj aŭtoj. Pramsĝipoj trafikas inter havenoj Virtsu kaj Kuivastu. Aviadile eblas veturi al Kuressaare el Tallinn kaj Pärnu, somere ankaŭ el Helsinko kaj Stokholmo.

Kontaktiĝi kun organizantoj eblas per reto: [lydia.lindla@net.ee](mailto:lydia.lindla@net.ee), tel. +372 507 79 73.

Ankaŭ mi mem nepre respondos: *esperant@hot.ee* tel. +372 5212147.

*Tõnu Hirsik*

---

## EST kunvenas en Cafe Art

Esperanto-societo en Turku daŭre havas diskutrondon ĉiun merkredon je 16.30, kiel tradicie, sed la loko ŝanĝiĝis: Nun ni kunvenas en *Cafe Art* ĉe Läntinen rantakatu, t.e. ĉe la riverbordo en la kvartalo inter Aurakatu kaj Kauppiaskatu.

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ [taneli.huuskonen@netsonic.fi](mailto:taneli.huuskonen@netsonic.fi) [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ [kari.kettunen@pp1.inet.fi](mailto:kari.kettunen@pp1.inet.fi)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Matti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ [matti.pennanen@phnet.fi](mailto:matti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ [lauri.liukkonen@jippii.fi](mailto:lauri.liukkonen@jippii.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ✉ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2005 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro **2006**

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
2	1.3.	15.3.	5.4.
3	1.5.	15.5.	5.6.
4	1.7.	15.7.	5.8.
5	1.9.	15.9.	5.10.
6	1.11.	15.11.	5.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



## Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus: vuosikerta \_ \_ \_ \_.

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

---

---

---

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy \_ / \_ \_.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu \_ / \_ \_ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

---

---

---

Kestotilaus vuosikerrasta \_ \_ \_ \_ alkaen.

Tilaus: vuosikerta \_ \_ \_ \_.

Tilaaajan, kestopilaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

---

---

---

**Posti-  
merkki**

**Suomen  
Esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65  
00530 Helsinki**

## Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Jutut 15.3.2006 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2006 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2006**